

Esperanto-vivo en Svislando, 10-a parto
Elementa kurso programita, 4-a parto: Deĵori kaj Ĉu
Claude Gacond, 399-a radioprelego, 1971.06.02 & 05

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni donis al vi esperanto-tradukon de prilingvaj klarigoj, kiuj aperis en la *Elementa kurso de esperanto programita por franclingvanoj*, kiun ni nun redaktas. Jen ni tradukas por vi klarigojn koncerne al etimologio, kiuj povas vin interesi. Ili aperis franclingve en la sepa leciono de tiu kurso.

A.- « *Tuj kiam vi partoprenos esperanto-renkontiĝon, tiam vi rimarkos la verbon **deĵori**, kiu ne ekzistas en la franca lingvo.* »

Cl.- Per kelkaj klarigoj ni komprenigas al la lernantoj la signifon de tiu verbo **deĵori**. Kaj en la kurso ni tiel daŭrigas :

A.- « *Etimologio instruas, ke tiu verbo **deĵori** pruntita el la rusa lingvo (rusa : **дежурит'**) fakte estas franca je deveno.*

Cl.- *Jen la historio de tiu vorto :*

A.- *Napoleono en sia soifo je konkeraj promenadis kun siaj soldatoj ĝis Moskvo. La rusaj knaboj profitis pri tio por sin instrui. Tiel tagon post tago ili aŭdadis alvoki iujn soldatojn. Ĉiufoje la nomo de la alvokito estis sekvata de la klarigo « **est de jour** ».*

Cl.- *Tiuj tri francaj vortoj **est de jour** estas galicismo, kiu tiam estis uzata por diri **est de service**. Laŭvorte ili signifas : **estas je tago**.*

A.- *Tre rapide la rusaj knaboj komprenis la signifon de tiu galicismo, por ili vorto, kies ekvivalento tiam ne ekzistis en ilia lingvo. Tiel per prunto ili kreis la verbon **дежурит**.*

Cl.- *Pli poste la rusaj verkistoj uzis tiun neologismon. Kaj ankoraŭ pli poste, je la fino de la dek-naŭa jarcento la unuaj esperantistoj, kiuj komencis tradukadi la verkojn de la rusaj verkistoj, ekrimarkis la originalecon de la verbo **дежурит**, apataĵo de la rusa lingvo.*

A.- *Ili enkondukis tiun vorton en la naskiĝantan esperanton sub la verba formo **deĵori**. Kaj la francoj tiam malkovris kun miro, ke temas pri galicismo aŭ esprimo propra al la franca lingvo, tio ĵus kiam tiu esprimo tendencis malaperi de la franca lingvo.*

Cl.- *Estas fakte tiel. Hodiaŭ en la franca oni ne plu diras : « Je suis de jour » [Mi estas je tago], sed « Je suis de corvée » [Mi estas je laboro] aŭ « Je suis de service » [Mi estas je servo]. »*

A.- En la programita kurso por franclingvanoj tiun klarigon pri la radiko **deĵori** sekvas lingvaj ekzercoj. Ni saltas ilin por alia etimologia klarigo, kiu povas vin interesi.

Cl.- Ofte la personoj, kiuj lernas esperanton, sin demandas, ĉu la adverbo **ĉu** estis kreita de la inicinto de esperanto ?

A.- Etimologio povas alporti respondon al tia demando.

Cl.- En la **pola** ekzistas demanda vorto, kiu estas prononcata **ĉi**. Ĝin oni skribas C Z Y (co zo ipsilono).

A.- Tiu ĉi morfemo aŭ vorteto havanta precizan gramatikan signifon ne restis propraĵo al tiu slava lingvo. Ĝin pruntis la **jida**, kiu estas germana dialekto, miksitaj per hebrea kaj slavaj vortoj, kaj uzata de la orienteŭropaj judoj. Tiun difinon ni pruntas el la *Plena Ilustrita Vortaro*.

Cl.- Tiam tiu pola morfemo **ĉi** prenis el la jida la formon **cu**.

Esperanto-vivo en Svislando, 10-a parto
Elementa kurso programita, 4-a parto: Deĵori kaj Ĉu
Claude Gacond, 399-a radioprelego, 1971.06.02 & 05

A.- Ludoviko-Lazaro Zamenhof, la iniciinto de esperanto, ĝuste vivis en tiu regiono de Eŭropo. Ĉar li estis judo, li konis la **jidan**. En la lernejo li parolis **pole** kaj ruse. Komparante tiujn ĉi lingvojn kun la aliaj, kiujn li studadis, li malkovris la utilecon de tiu morfemo **ĉi** aŭ **cu** propraj al la **pola** kaj **jida**. Kaj li enkondukis ĝin en esperanton sub la formo **ĉu** : hibrido inter la **pola ĉi** kaj la **jida cu**.

Cl.- Tiu morfemo **ĉu**, kiel la franca morfemo **est-ce que**, donas al la frazo grandan flekseblecon, kiun ne konas la lingvoj, en kiuj ĝi mankas. »

A.- En la *programita kurso de esperanto por franclingvanoj* ekzercoj denove sekvas tiun etimologian klarigon. Ni ilin ree saltas. En la konkludo ni diras al la gelernantoj :

Cl.- « *Eble tiuj kelkaj lingvaj kaj etimologiaj klarigoj komprenigis al vi, ke plan-lingvo estas tiom riĉa je stud-objekto, kiom la **neregulaj** lingvoj.* »

A.- Tiu konkludo estas por ni gravega. Se ni analizas la sintenon de multaj simpatiantoj al esperanto, ni iom post iom rimarkas, ke ili vidas en esperanto ilon certe utilan, sed ilon, kiun ili kredas malpli valora, ol la naciaj lingvoj.

Cl.- Ni povos detrui tiujn falsajn ideojn, nur se ni sisteme komprenigas al la esperanto-gelernantoj, ke esperanto ne estas malpli riĉa, malpli esprimpova, malpli histori plena, malpli nuancohava, ol la aliaj lingvoj.

A.- Tiuj kelkaj etimologiaj ekzemploj, kiujn ni enkondukis en nian *elementan kurson de esperanto por franclingvanoj*, celas komprenigi al la intelektuloj, kiuj interesiĝas pri esperanto, ke la zamenhofa lingvo estas pli ol infana ludilo, ke ĝi estas idiomo kompleta, kies studo estas riĉiga.

Cl.- Ni provas rikolti multajn ekzemplojn, kiuj bone konkretigas la riĉecon de esperanto. Kaj ni estas certaj, ke se ni kapablos ilin encerbigi al niaj gelernantoj, ni ne estos perdintaj nian tempon dediĉinte plurajn jarojn al la verkado de programita kurso.

A.- En tiu laboro ni troviĝas antaŭ grava demando. Ni devas esti certaj pri la ekzakteco de niaj diroj. Ni devas fari sciencajn laborojn. Pro tio, se niaj slavaj aŭ jidaj geaŭdantoj rimarkis eraron en nia etimologia argumentado, tiam ili kritike skribu al ni. Ni nepre devas eviti disvastigi falsajn lingvajn konojn.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-